

aprilo 2012 (133)

Juna Amiko

Internacia revuo por komencantoj kaj lernantoj de la lingvo Esperanto



Amikeca kunveno
horeca-germana



NOVAJ RUBRIKOJ!

LOGIKAJ LUDOJ
DE LA
MONDO

PAGŬO **16**



PAGŬO **26**

INTERVJŬO DE
L'REVUO:

HISPANA DANCISTO





AVENTUROJ DE
ESPLO&REMA

KARINA MACGILL

Karaj Legantoj, kaj Al-legatantoj!

Ni skribas al vi de la malproksima kaj ekzotika ĝangalo de Jagauro. Ni, Rema kaj Esplo, estas spertaj vojaĝantoj, ĉiam serĉantaj la venontan eblan lokon por viziti, trezoron por malkovri, kaj amikojn por ekoni.

Ni invitas vin akompani nin en niaj aventuroj, kiel helpantoj kaj amikoj. Ni kune rigardu danĝeron kaj malcertecon en la okulojn!


Sekvu nin tra la framoj de la suba bildstrio, kaj estu nia helpanto se ni trafos ne antaŭvidatan obstaklon! Tiunmaniere ni kune solvos la enigmon de la labirinto de Jagauro.

Karaj gepatroj!

Kelkaj taskoj postulos, ke niaj helpantoj skribu aŭ desegnu en la bildstrion. Se vi ŝatus ebligi al ili plurfoje ludi la enigmojn, aŭ havas pli ol unu helponteton, ni proponas al vi fotokopii la paĝojn, kaj donu la fotokopiojn al ili!

Kore,
Esplo kaj Rema

Mi flugos super ĝin,
al paĝo ok por gvidi vin
al la alia flanko.



Nia

oferto!



6

Reto-faktoj

Legu kaj miru! Komunika revolucio!

7

Kovrilbilda klarigo

Transkontinenta amikeco

8

LUME: Esplo kaj Rema

Nova rubrikestro debutas! Kunludu!

14

Banko-rabo

Ludu detektivon, trovu la kriminton!

16

Ludoj, enigmoj

La Kubo de Rubik

18

Ekskursi kun aŭ per biciklo?

Konversaciaj temoj – la kutima ekzamens-prepara rubriko de Judit Felszeghy

21

Libro-recenzo

La Multiplika Ĉapelo

22

LUDE: Plia bildstrio!

Lernantoj de Monika Molnar invitas vin al verkado!

26

Intervjuo de l'revuo

Nova rubriko – renkontu niajn artistojn!

30

Legu kaj Ĝuu

Libro-rekomendoj, prezento de Kroatio kaj kelkaj proverboj.

36

Interkultura Mondo

Rimarkinda vizito de koreanoj al lernejoj en Tajvano

42

Bildoj el nia Literaturo

Roman-verkisto István Nemere sub la lupeo; serio de Baldur Ragnarsson

40

La vikio-kivio

Antipoda birdo vizitigas vin al la Esperanta Vikipedio!

44

Plia kvizo

de Dieter Berndt

46

LASTE reaperas!

Urbo-perturbo – montru viajn geografiajn konojn. Solvu kruc-enigmon pri LUME.

50

Juna amiko urĝe bezonas pliajn fortojn!

Ni plue serĉas redaktoron por duono de la revuo; por varba direktoro kaj prizorganto de nove starigenda retpaĝaro por la revuo! Ĉu nia revuo havos estonton? Tio dependas de ni ĉiuj!




Nova jaro, nova vesto

Bonvenon al via juna amiko por 2012 kaj al ĝia nova aspekto!
Nova titolstrio, nova redakcio, novaj rubrikoj – nova amiko!

Trovu ene du novajn rubrikojn. Sur paĝo naŭ jen nova rubriko pri ludiloj; sur la mezaj paĝoj, jen intervjuo de l'revuo, la unua kun juna praktikanto de moderna danco. Trovu konatan rubrikon – LUME – kun nova aspekto kaj nova prizorganto. Karina MacGill estas tamen al vi konata pere de la desegnaĵoj, kiuj regule aperis en nia dua kovril-paĝo. Ĉi-foje ŝi uzis tiun lokon por prezenti la du rolulojn, kiuj aperos regule ekde nun ĉe LUME. Esplo kaj Rema invitos niajn etulojn partopreni en aventuroj. Estante trejnata instruisto, ŝi akiras spertojn, kiuj helpas bone prizorgi tiun rubrikon.

La nunan numeron redaktis la subskribinto; tio espereble estas dumtempa situacio – plue ni serĉadas redaktoron por prizorgi duonon de la numero – vidu paĝon 50. La redakta tasko fariĝas iom pli eltenebla pro la kreskanta reto de rubrikuloj, kiuj liveras preskaŭ prespretan materialon. Ni kuraĝigas ankaŭ al niaj kontribuantoj agi same – gvidilo por tio ekzistas!


Ni demandas nin, kiuj temoj kaj stiloj plaĉas al nia legantaro? Ne nur la nuna legantaro, sed ankaŭ tiuj homoj, kiujn ni volus altiri al nia revuo. Gravas demandi tion, ĉar la revuo klare ne havas sufiĉajn legantojn – ILEI, la eldonanto, devis tra la lastaj jaroj kovri pli ol mil eŭrajn deficitojn – ne eblas elteni tion eterne. Do, bonvolu montri la novan aspekton de la revuo al viaj amikoj! Skribu al ni, kio plaĉas al vi pri la nuna numero, kaj kio ne. Bonvenas viaj proponoj por pli instiga revuo. Donu vian opinion pri nia nova koncepto! Ĉu ĝi estas...



bonega



bona



boneta



malbona



katastrofa?


Bonan legadon kaj reagemon!

Stefan,

RETALIRO – RETDELIRO

Ni supozas, ke vi uzas la komputilan reton. Ĉu vi imagas, kiom ĝi ŝanĝis la viv-stilojn kaj labor-manierojn de la homoj? Ĉu vi imagas, kiom ĝi kreskegis, kaj kiom enorma ĝi nun estas? En unu tago...

- La taga trafiko plenigus 168 milionojn da DVD-diskoj.
- Oni sendas 294 bilionojn da retleteroj ĉiutage. Por pritrakti tiom da leteroj, la usona poŝto bezonus du jarojn.
- Du milionoj da blogo-skriboj estas verkitaj, sufiĉe por plenigi tipan semajnan revuon dum pli ol 750 jaroj.
- 172 milionoj da personoj vizitas Fejsbukon, 40 milionoj tvitas, 22 milionoj iras al *LinkedIn* kaj 20 milionoj al *Google+*.
- 4.7 bilionoj da minutoj estas pasigitaj ĉe Fejsbuko.
- 532 milionoj da status-raportoj estas faritaj.
- 250 milionoj da fotoj estas enŝutitaj; se ili estus ĉiuj presitaj, ilia stako altus kiel 80 *Eiffel*-turoj.
- 22 milionoj da horoj estas dediĉitaj al rigardado de malnovaj televidaj programoj aŭ filmoj en *Netflix* – tiom da rigardo-horoj oni amasigas en ĉiuj kinejoj de Usono nur en tri tagoj.
- 864,000 milionoj da horoj da filmetoj estas alŝutitaj al Utubo.
- 18.7 milionoj da horoj da muziko fluas el Pandora al aŭskultantoj; se unu komputilo devus fari tion, tio daŭrus pli ol 2000 jarojn.
- Aperas averaĝe 1288 novaj elŝuteblaj komputil-programoj ĉiutage; oni elŝtuas tage pli ol 35 milionojn da programoj.
- Vendoj de ir-telefono *iPhone* (378,000) pli multas en unu tago ol la nombro da naskoj tra la tuta mondo (371,000)



Fonto: MBAonline.com. Licencita laŭ la sistemo Kreivaj Komunaĵoj. Kompilis SMG

Jen nova recepto:

2 landoj

2 lernejoj

4 instruistoj

6 semajnoj

8 lernantoj

Centoj da konatuloj

Miloj da evento-plenaj

minutoj

Dekmiloj da kilometroj

da distanco

MULTE da ĝojoj kaj

AMASO da travivaĵoj



HERZBERG AM HARZ RAPORTAS: 10 MIL KILOMETRA AMIKECO


El tiu recepto kreiĝis novbakita amikeco inter lernejoj el Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo – kaj grupo de lernantoj el sud-korea alternativa lernejo. Dank' al la organiza laboro kaj gastigado de Interkultura Centro Herzberg la gastoj povis pasigi kvin semajnojn en Herzberg kaj viziti lerneajn studhorojn ĉefe en la t.n. meza lernejo. Por tiu periodo la direktorino de la germana lernejo farigis specialan horaron, kiu ebligis al la eksterlandaj gastoj viziton al regulaj lecionoj ekzemple pri arto, muziko, sporto, kemio, biologio, sed enestis en la programo ankaŭ specialaĵoj, kiel kuirado kaj mur-grimpado.

Vizitante diversajn klasojn kaj studhorojn ili konatiĝis kun multaj germanaj samaĝuloj; dum la lecionoj, la paŭzoj kaj posttagmezaj ekster-lernejaj programoj la amikeco fortiĝis. La kvin-semajnan programon, vizitojn al aliaj lernejoj, Esperanto-klubo, ekskursojn al aliaj urboj kunordigis la 4 instruistoj: Songanta kaj Suno, gekolegoj el Koreio kune kun Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka, kiuj kun aliaj porokazaj helpantoj zorgis ankaŭ pri intensa Esperanto-instruado al la lernantoj. Ni kreis ankaŭ eblon por la gastoj prezenti sin en multaj lokoj, eventoj en la Esperanto-urbo kaj montri siajn kapablojn, talenton pri muziko, kantado, dancado. Iliaj prezentadoj restos belaj memoraĵoj por centoj da urbanoj, por centoj da novaj geamikoj kaj konatuloj.

Vidu la bildon sur nia kovrilpaĝo – kaj legu sur p 36 pri simila interŝanĝo ene de Azio.

LUME

LA UNUA MIRINDA ETAĜO




Rubrikestro: Karina MacGill

Jen la labirinto!
Helpu al mi konduki Rema tra ĝi;
desegnu sagojn direktantajn la
ĝustan vojon en la spacoj. Ne forgesu,
vi devas pensi el ŝia vidpunkto!

dekstre ➔ maldekstre ← rekte ↕ reen ↶

Rema! Iru -en, ĉe la dua ebleco turnu vin -en,
turniĝu -en, trairu pasejon,
kaj iru -en...



devus Mi
suben! ion
Venu kion
vidi.
trovis vi

Mi ne komprenas!



Kion Rema diris al Esplo:

.....
.....

enskribu la solvon!

Ĉu vi povus ordigi ŝiajn vortojn por mi?






Vel! La radio misfunkcias. Kion ŝi povis celi?

Bonege, vi tamen komprenis min.

Dank' al nia helpanto!






Vidu pli da artaĵoj de Karina: rigardu la sekcion 'Esperantaj bild-strioj' en la galerio, ĉe: <http://rowena-lovegood.deviantart.com/>

Manko-manio

En ĉiu kvadrato, ni proponas kvar vortojn. Sed, ve! Ĉiu vorto havas mankon – parto de la vorto malĉeestas – forŝtelita de iu nekonata misfarulo. Feliĉe, en ĉiuj kvar vortoj mankas la sama vortoparto. Decidu, kiu ĝi estas, kaj skribu ĝin en la suban spacan.

s
mg

S____bas Hipo____to Sans____to Manus____pto <input type="text"/>	Sta____ Prak____ Ver____la Aŭten____ <input type="text"/>	Kvan____ ____eno Medi____ento ____iono <input type="text"/>
Kam____no A____to Ri____ta Pre____nto <input type="text"/>	Ra____to Plu____ta ____struas E____omio <input type="text"/>	Ku____bo Tra____as Kon____so Se____a <input type="text"/>
Difer____ S____hava Frekv____ Kom____ta. <input type="text"/>		

Se vi ĝuste trovis la mankintajn vortojn, vi formis titolon por raporto pri la du bestegoj en nia bildo!

Sendu al ni vian solvon <stefan.macgill@gmail.com> kaj ni lotumos premiojn!



KANTU kun JUNA AMIKO

LA SORĈA KANTO-MONDO

Preparis por LUME: Małgosia Komarnicka

ul.Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin,

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



Kanto estas ĉie. Ĝi akompanas nin hejme, en vendejo, sur strato, en buso... Ni volonte aŭskultas kantojn ne nur kiam ni estas lacaĵ, malgajaj kaj zorgoplenaj por renovigi niajn fortojn. Kanto helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, permesas revii aŭ transdoni niajn sentojn. Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj pli interesiĝas pri la prezentataj temoj. Ludante ili samtempe lernas. Kanto influas agrablan etoson de lernado kaj kreskigas emocian engaĝiĝon de partoprenantoj en la lerno-procezo. Tio permesas eĉ al nekuraĝaj lernantoj fariĝi pli kuraĝaj.

La lernantoj povas forgesi ekzercojn de la lasta leciono, sed ne kanton. Sufiĉas nur ekkanti kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono ofte ne konsciante, ke ili ekzercas fremdan lingvon.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, do ni ne malhelpu ĉi agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

Mi prezentas la kanton *KOLOROJ*, kiun bele prilaboris kun siaj lernantoj Ela Hareźlak el Pollando. Ŝi de jaroj okupiĝas pri la plej junaj lernantoj kaj kun granda sukceso instruas al ili Esperanton.

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn, ke ni ekkonu belajn kantojn el la tuta mondo.

Mi invitas al la sorĉa kanto-mondo.


Fla-va es-tas kam-pa flo - ro, ru-ĝa es-tas
mi - a ko - ro. Blu - a es - tas
la ĉi - e - lo, ver-da l'es-pe-ran-ta ste - lo.

KOLOROJ

Flava estas kampa floro,
ruĝa estas mia koro.



Blua estas la ĉielo,
verda l' esperanta stelo.




Blanka estas nia kreto,
bruna estas la hundeto.






Blua estas la ĉielo,
verda l' esperanta stelo.

Griza estas la nebulo,
nigra estas la tabulo.



Blua estas la ĉielo,
verda l' esperanta stelo.



blanka blua flava ruĝa verda nigra griza bruna

KANTU, KOLORJGU kaj SOLVU!



Je la 13a horo kaj 10 minutoj – tuj post la tag-meza paŭzo – la 20an de januaro en 2012 okazis krimo en la banko 'AkajZ' en la centro de Belurbo.

Bonŝance neniu mortis aŭ vundiĝis, sed la krimuloj forkuris kun la mono.

Dum la esploro la polico eksciis, ke en la banko estis ĉirkaŭ 10 personoj, kun la du bank-oficistoj, kaj ili vidis neniun plian personon eniri, la krimulo – aŭ eble du krimuloj – jam estis en la banko, inter la klientoj.



La polico pridemandis ĉiujn, por trovi la krimulojn.

Jen, tiel raportis iu ĉeestinto, al la polico.

„Estis lundo, la 20-an de januaro en 2012. Mi atendis la bank-oficiston en la banko. En la banko estis ĉirkaŭ 10 personoj. Estis je la 13a horo kaj 10 minutoj. Io defalis. Mi turniĝis, sed iu kriis: „Sur la teron!” Mi tre ektimis. Mi eble vidis ŝian vizaĝon. Ŝi estis juna virino. Eble ŝi havis blondan hararon aŭ brunan. Mi ne memoras. Mi kuŝis sur la planko. Alia persono diris ion. Mi kredas, ke estis du rabistoj, viro kaj virino. Mi pensas, ke la virino fermis la pordon. Mi certas, ke virino estis, ŝiaj ŝuoj frapis sur la planko. Mi sentis fum-odoron. Verŝajne ŝi fumas. La viro ne parolis, li rond-iris en la banko. Unufoje mi vidis lian figuron. Li surhavis trejn-vestaĵon. Li estis dika kaj li estis senhara. La virino alparolis lin: „Husein!” La viro estis kolera kaj ili inter-kverelis. Iu ploris mallaŭte. Mia

kapo doloris. Mi ne memoras pri alio. Supozeble mi svenis. Kiam mi vekigis, policistoj estis apud mi.”

Ĉu vi povus trovi la krimulojn laŭ tio, inter la subaj fotoj? Dankon por via helpo!



(Laŭ la instigo de Judit Felszeghy la raporton verkis Brigitta Bodó; ŝi eklernis Esperanton en septembro 2011, en Szegedi Tudományegyetem, Juhász Gyula Pedagógusképző Kar /Universitato de sciencoj en urbo Szeged, Pedagogia fakultato ‘Juhász Gyula’/)

Vortklarigoj:

paŭzo: interrompo en agado / *banko*: ŝtata institucio aŭ privata firma por financaj operacioj

kliento: utima aĉetanto de butikoj, kompanio, servoprovizanto

blonda: hela harkoloro inter ora kaj helbruna / *persono* havanta tiukoloran hararon

rabi: perforte forpreni tion, kio apartenas al alia / *figuro*: videbla ekstera formo de estaĵo aŭ objekto

trejnvestaĵo: sporta vestaĵo / *supozi*: provizore akcepti ion kiel veran aŭ eblan

kvereli: kolere, brue aŭ eĉ perforte interdisputi kaj malpacigi

sveni: perdi dum kelkaj momentoj la konscion kaj sinmovon




LOGIKAJ LUDOJ de la MONDO

Rubrikestro:

Julianna Vas-Szegedi,
vszjunaamiko@gmail.com

Kiam mi estis infano ofte mi ludis kun mia patro kaj avo, kiuj instruis al mi tre interesajn logikajn ludojn. Nun, kiam mi iĝis patrino, kaj mi havas tri gefilojn, ankaŭ mi ekis instrui miajn gefilojn pri tiuj ludoj. Certe multaj el inter vi interesiĝas pri tiu temo, do venis ideo al mia kapo montri diversajn logikajn ludojn kaj ludilojn al la legantoj. Se vin interesas la temo, bv. sendi al mia ret-adreso viajn ideojn: kiujn (logikajn) ludilojn vi montrus al aliaj infanoj. Certe en ĉiuj landoj de la mondo oni eltrovis tre interesajn ludojn por cerbumigi nin. Ne hezitu, sendu al ni viajn ideojn kun kelkaj fotoj kaj priskribo de la ludo aŭ ludilo!



Nun, komence mi prezentos al vi la faman Rubik Kubon, kio estas tre mond-fama, multe da infanoj konas ĝin, kaj multaj ankoraŭ ne. Jen kelkaj vortoj pri ĝia historio:

La kubo de Rubik, (aŭ Rubik-kubo, Rubik-a kubo), kiun oni ofte nomas „magia kubo,, estas pacienco-ludo, kiun eltrovis la hungaro Rubik Ernő.

Temas pri kubo, kiu estas dividita laŭ alto, larĝo kaj profundo je tri ebenaĵoj kiuj estas laŭplaĉe turneblaj en 90-grada paŝo ĉirkaŭ akso. Tie la pozicioj kaj la situoj ŝanĝiĝas hazarde. La ekstera surfaco de la kubo estas kolorigita. La celo estas reakiri la komencan unuecan pozicion, kiam ĉiu flanko havas unuecajn kolorojn. Tio okazas el miksiita kolorflanka kubo per turno ĉirkaŭ la tri aksoj. Al laikoj (amatoroj) tio ŝajnas tre malfacila tasko, preskaŭ ne ebla, sed oni ellaboris strategion, kiu relative facilan kaj rapidan solvon de la tasko ebligas. Profesie eblas rearanĝi la kubon dum 30 sekundoj.

Ĝi populariĝis kaj disvastiĝis mondscale en la 1980-aj jaroj. La „kubo-frenezaĵo” en 1981 atingis sian pinton. Oni vendis nur ĝis 1981 ĉirkaŭ 260

milionojn da kubjo. De tiam aperis diversaj aliaj kuboj kaj ludiloj kun simila lud-mekanismo. Vidu ekzemplojn sube.







Poste fondiĝis en la mondo Rubik-Kub-Kluboj. Nuntempe estas organizataj regule konkursoj, kiujn partoprenas aliĝantoj el ĉiuj anguloj de la mondo. Kvankam la eltrovinto de la ludo estas hungara inĝeniero, tamen ĝi tre rapide ekfamiĝis tra la mondo.


1981, Danio, Rubik-kuba konkurso inter junuloj

VARIOJ DE RUBIK KUBO:


Estis konstruita diversgrandaj kuboj: $2 \times 2 \times 2$, $4 \times 4 \times 4$ kaj $5 \times 5 \times 5$ (Kubo de la profesoro):




La formo ne devas esti nur „kubo“, sed ĝi povas havi alian formon:




„Diamanto“



„Piramido“



„Megaminkso“



„Dogiko“

Julianna Vas-Szegedi

I. Donace biciklon!

- Panjo...!
- Diru, fileto!
- La geknaboj de nia klaso planas grandan ekskurson bicikle por la printempa lerneja ferio.
- Kaj ankaŭ vi volas partopreni, ĉu?
- Jes, panjo, sed... mia biciklo...
- Kio pri la biciklo?
- Ĝi estas jam malnova.
- Ĉuuu? Ni aĉetis ĝin nur last-jare!
- Tio okazis jam antaŭ unu jaro kaj kvin monatoj. Krome ĝi estas malbela, malrapida, kaj ankaŭ malkomforta.
- Kaj tial vi deziras donace novan, belan, komfortan biciklon, ĉu?
- Ja jes, kara Panjo! Kaj ankaŭ rapidan...
- Mi parolos kun Paĉjo, ke por via baldaŭa naskiĝ-tago la donaco estu la nova, bela, rapida



II. Ek al la ekskurso!

- Jen, fileto, mi jam ĉion pakis por vi: sandviĉojn kun kolbaso kaj kun fromaĝo, aparte vi trovos kapsikon, tomaton kaj fruktojn. Mi aldonis ankaŭ tranĉilon kaj buŝtukojn. Ĉi tie, en la botelo estas

teo, en la alia akvo. Ho, jes, mi metis ankaŭ necesejan paperon en vian dorso-sakon kaj jen, en la antaŭan poŝeton sapon, dento-paston kaj dento-broson. Vi ankoraŭ aldonu viajn vestaĵojn, kaj supren ni alkroĉos la kovrilon. Metu la dorso-sakon sur la novan biciklon, kaj estas jam tempo por ekiri.

- Panjo, dume mi ekhavis ideon!
- ?
- Pli simple estus komenci la ekskurson ne ĉi tie, sed ĉe la Kanara Lago. Tie ni tranoktos, morgaŭ ni ĉirkaŭbiciklos la lagon, kaj la postan tagon ni revenos, same bicikle.
- Kaj kiel vi deziras aliri la Kanaran Lagon?
- Mi pensis ankaŭ pri tio! Kun paĉjo vi povas
- viziti la lagon, kaj veturigi min kun la biciklo tien!
- Tio devus esti via kaj ne nia ekskurso, fileto! Sed, do, bone... Se Paĉjo konsentos, li ligos la biciklon sur la tegmenton de la aŭto.



III. Hejmenveturo – sed kiel?

- Halo, Panjo? Parolas ja mi, Steĉjo!
- Jes, fileto, mi aŭskultas vin. Kiam vi ekiros hejmen?
- Panjo kara, estas granda problemo!
- Kio do okazis?
- Pluvegas! Jam ekde frua mateno! Fulmotondras kaj malvarma ventego blovas!
- Surmetu vian pluv-mantelon kaj bicikladu atente!
- Sed Panjo! Terurega vetero estas! Mi ne povas bicikladi en tia veteraĉo



preskaŭ kvindek kilometrojn!

- Fileto, kion mi aŭdas denove? Ĉu vi eble volas, ke denove ni veturigu vin kun via biciklo, per la aŭto? Vi deziris la biciklon por sportumi, ekskursi per biciklo kaj ne kun ĝi! Kion vi faris hieraŭ?
- Hieraŭ estis tre bona vetero, Panjo, kaj ni ludis, sunumis, eĉ naĝis en la lago, vespere kantis ĉe fajro, estis mirinde.
- Sed ĉu vi almenaŭ bicikladis hieraŭ, ĉirkaŭ la lago?
- Ne. Por tio ne restis tempo.

TASKOJ:

Trovu verbojn por uzi kun „KUN“ kaj „PER“!

Vicigu, kion vi enmetus en dorsosakon por tritaga ekskurso!

Vicigu, kiujn veturilojn vi uzas /deziras por ekskursi (pensu ankaŭ pri surakvaj veturiloj)!

Vicigu, kia devas esti veturilo por ekskursi – trovu kiel eble plej multajn vortojn!

Vicigu verbojn, kion vi faras dum ekskurso (apud lago)!

Rakontu per propraj vortoj, (sen citaĵoj) kio okazis laŭ la supraj dialogoj!

Raportu pri via propra ekskurso!

Vortklarigoj:

Komforta ~: Objekto, kiu malpliigas penon kaj laciĝon, igas la vivadon pli facila

Sandviĉo: Rapidmanĝaĵo el pano enranĉita aŭ disduigita, farĉita per legomoj, viandoj aŭ saŭcoj

Kolbaso: Manĝaĵo el farĉita erigita, sekigita aŭ fumigita viando

Fromaĝo: Manĝaĵo seka aŭ duonseka, preparita el fermentita lakto

Kapsiko, tomato: Legomoj manĝataj ofte freŝe aŭ en salatoj

Tuko: Peco da teksaĵo / *buŝtuko:* Tuko (pli ofte jam papero) por purigi la buŝon post manĝo

Dento-braso: Purigilo por dentaro farita el artefaritaj haregoj kun tenilo

Kroĉi: Fiksteno ion per io hokforma (kaj ofte pika) aŭ ĉirkaŭprena

Kano: Alta herbo kreskanta en malseka tero aŭ apud / sur / en akvo

Fulmo-tondro: Granda bruo akompananta elektran atmosferan fenomenon dum ŝtormo

Blovi: Puŝi, ekmovi aeron

Longa vojo inter Gresillon kaj Hanojo – sed Esperanto ambaŭloke

2012 julio 28 / aŭgusto 04: **Internacia Infana Kongreseto** dum UK en Hanojo. Taŭga por infanoj ĝis 17-jaraj adoleskuloj. Informoj interrete: bertosch.free.fr/iik2012 kaj kontakto: bertox@free.fr

2012 aŭgusto 11/20: **Pupteatra festivalo** por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj.

Informoj interrete: gresillon.org/s4

Kontaktoj: kastelo@gresillon.org, +33-241 89 10 34, www.gresillon.org

LIBRO-RECENZO:

KIO MANKAS, KIO NE MANKAS?


Ĉu vi ŝatas legi rakonton pri homoj, kiuj scias kuiru tre bongustajn manĝaĵojn? Jen bona libro: *La multiplika ĉapelo*. Ĝi konvenas por vi, se vi estas 8-jara aŭ pli kaj bone komprenas Esperanton. La libro ne tro longas – ĝi enhavas nur 16 paĝojn, kun multaj koloraj bildoj. Se vi mem ankoraŭ ne tro bone povas legi, petu al gepatro, pli aĝa gefrato, amiko aŭ instruisto legi ĝin al vi.

En la rakonto estas urbestro, al kiu ege mankus dimanĉmatene pomtorto kun batita kemo ĉe la kafo, sed ne mankas al li multiplikado – ĉefe ĉar li ne scias, kio ĝi estas, nek por kio ĝi utilas. Li ne komprenis, kial li eraris en la aĉeto de pavimoj por la stratoj de la urbo. Feliĉe, urbestro de najbara urbo donas al li solvon, en la formo de mirinda multiplika ĉapelo.

Verkis la libron Lieke Wagemaker, ĝin tradukis al Esperanto Roel Haverman, ilustris Jeannette Eisses, kaj ĝin eldonis *De Trompet*, Nederlando, 2011. ISBN: 9789081841504. Recenzis: smg. Prezo: €3,80 ĉe UEA aŭ multicapelo@gmail.com

Multe pli da libroj kaj lerniloj estas prezentataj en la retejoj edukado.net kaj lernu.net





La rubrikon prizorgas:
Mónika Molnár



Ŝajnas al mi, ke vi ankoraŭ ne konas la plej novan historieton pri Verkemulido kaj Desegnemulido. Ĉu vi entute konas ilin? Ĉu vi scias kion ŝatas fari la infano de Verkemulo? Jes, certel! Verki. Li ŝatas verki, tio signifas skribi historiojn, poemojn, romanojn, ktp. Kaj la ido de Desegnemulo? Vi divenis! Li dirite, jam kiam li estis ĉiam kaj ĉien. Jes, jes, ĉien, meblojn, ktp. La gepatroj havis sufiĉe da zorgoj pro li. Sed intertempe li grandiĝis. Bonŝance la desegnemo restis kaj same bonŝance la muroj kaj la mebloj ne plu konvenajn paper-folioj. kaj kreas kunlabori kun






tre ŝatas desegni. Inter ni malgrandeta, li desegnis eĉ sur la murojn kaj sur la





sekvaj paĝoj vi vidas bele desegnitajn historion laboro dankon al Debora Danton el Svislando!), vortoj. Petu helpon de plenkreskulo por paĝojn kaj ek al verkado de historio! Kiel vi titolo mankas, sed se vi bone rigardas la bildojn, vi certe tuj vidas, ke temas pri amik-serĉado. Viajn verkojn sendu ĝis la 31a de majo al la lernejo de Debora: *Ecole de La Grande Ourse, Esperanto-konkurso,*








Recrêtes 18, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando kie ŝi kaj ŝiaj samklasanoj elektos la plej plaĉan historion, kiu gajnos tiun ĉi konkurseton. Ne forgesu legeble skribi viajn nomon, aĝon, lernejon, kompletan adreson por ke ni povu sendi al vi la premion, se vi estos la gajninto. La gajnintan historion ni aperigos sekvont-numere en LUDE.

Bonan verkemon al ĉiuj!









INTERVJUO DE L'REVUO

La esenco, ene de ni, kiu de si mem elvenas

Indalecio Seura García estas nova, juna esperantisto, kiu nun staĝas en la Esperanto-urbo, Herzberg. Aldone al surlokaj laboroj, li komencis plenumi taskojn ankaŭ por ILEI. Ni opiniis inda, ke la legantoj de *Juna amiko* ekkonu lin. Li plenumis universitatajn studojn kiel instruisto pri sportedukado, sed havas aliajn interesojn kaj talentojn. Li praktikas nuntempan dancadon en serio da trupoj kaj kompanioj kaj krome instruis la dancarton. Al 'Inda', kiel ni eknomas lin, ni starigis kelkajn demandojn:



De kie venas via komenca interesiĝo pri danco – kaj specife pri la nuntempa danco?

Kiam mi estis 5-jara, mia patrino aŭdis pri nova danc-akademio en mia vilaĝo. Mi estis tre nervozema kaj regi min estis malfacila tasko. Do, tute laca, ŝi aligis min en la grupon – feliĉe kune kun mia ĝemelo, por lerni folkloran dancadon. Tiel, mi dancadis ne nur folklore, sed pliaĝe ankaŭ flamenke. Pasint-jare, la ebleco foriri de mia urbo kaj lerni alian stilon de danco – verdire mi ne tute sciis pri kio temis – tre interesis min. Do, mi faris dancprovon en Seviljo, kaj ili akceptis min kiel studenton de nuntempa danco. Ĝis nun, neniuj aliaj stiloj interesis min tiomgrade.



Kio por vi estas la esenco de 'moderna/nuntempa danco'?

Mi kredas, ke por ĉiuj artoj, oni devas naskiĝi kun speciala sento. Ekzistas multaj stiloj en la danc-mondo kaj unu el ili estas ĝusta por vi. Kompreneble, mi nur eksciis kiu ĝis post la provo. Do, la 'esenco' estas alinomigebla kiel 'sento', kiun ene ni havas kaj de

si mem elvenas. La danco, kiel lingvo, permesas transdoni ĉi tiun senton, sed korpe. Tial moderna danco ligiĝas kun teatro, kaj oni faras ne danc-spektaklon, sed danc-teatr-spektaklon.




Vi foje instruis sporton. Ĉu vi vidas en danco ligo-punkton inter la artoj kaj sporto?

Jes, kompreneble. La danco, en si mem, estas arto. Oni devas havi ion specialan por danci. Sed vere, oni ne konscias pri la granda laboro kaj la suferiga ekzercado kiun oni devas fari dum multaj jaroj por esti dancisto. Same kiel por multaj sportistoj, bedaŭrinde, oni vidas ĝin amuzado kaj “ne vera profesio”. Tamen, dancon oni ne povas nomi kiel sporton, ĉar tio estas nur la fizika aktiveco, kiu havas kontraŭulojn kaj estas regulata. Kiam oni prezentas modernan danc-spektaklon oni ne vidas regulojn, nek kontraŭulojn. Do, mi ne tute scias, sed sekvante tiun ideon, eble la danc-konkursoj estas konsidereblaj sporto.



Kiajn pliajn interesiĝojn vi havas?



Mia plej ŝatata interesiĝo estas la danco. Lerni pli kaj pli, kaj povi fari miajn proprajn aferojn. Sed verdire mi, kiel persono, havas ankaŭ aliajn interesojn. Unu el ili estas lerni Esperanton. La ideo trovi manieron por bone interkomunkiĝi tra ĉiuj mondpartoj estis sufiĉe por vekti en mi scivolemon pri Esperanto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Poste, al mi tre plaĉas ludi gitaron kaj kanti, spite ke mi ne havas belan voĉon. Lerni ludi muzikilojn ankaŭ al mi plaĉas.

Mi esperas havi pli da tempo por povi praktiki ilin. Krome, mi tre ŝatus lerni la japanan lingvon.



Kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

Antaŭ du jaroj, mi tre enuis, ĉar mi feriiis kaj havis nenion por fari. Do... momenton, mi memoris prelegon de mia historio-profesoro kiu unu-foje, kiam mi estis 12-jara, parolis al ni pri

Esperanto. Mi serĉis en guglo pri la lingvo. Tiom plaĉis al mi ke mi eklernis sam-tage. Poste, mi ne konis iun kun kiu mi povus praktiki la lingvon. Bedaŭrinde en mia urbo apenaŭ estas esperantistoj kaj tiam mi perdis intereson. Antaŭ jaro, mi reprenis la lingvon ĉar vere estas bonega ideo kaj intereso por mi.



Vi pasigis tempon en 2010 kaj 2011 en Italio. Kiuj estas viaj impresoj kaj atingoj el tiu tempo?

Bone... tre malfacila demando por mi. Mi estas en la sudo, precize Catania. Mi havas grandegajn memorojn pro la amikecoj (italoj kaj eksterlandanoj) kiujn mi atingis kaj la bela urbo. Sed, verdire, al mi plaĉis neniel la labor-maniero en tiu tre fama lernejo. La kunlaborantoj ne zorgis pri ni, kaj apenaŭ sciis niajn proprajn nomojn. Tio malfaciligis la sperton. Poste, mi provis serĉi laboron, sed ne sukcesis kaj pro tio mi devis reveni al Hispanio. Sed, kun ĉi tiu sperto, mi atingis grandajn amikojn kaj lernis la belan italan lingvon.



Muziko klare ligiĝas kun danco, kaj vi muzikis en muziklernejo tra dek jaroj. Kian muzikon vi ŝatas?

Mi tre ŝatas la keltan kaj porfilman muzikon. Mi kutimas uzi ĉi tiujn du muzikstilojn por pretigi miajn danc-lecionojn. Poste, mi aŭskultas diversajn stilojn, interalie al la 'peza' muziko (*Heavy*). Mi havas preferatajn grupojn de *Heavy*, kaj mi kutimas uzi ilin en danc-lecionoj.



Kion vi opinias pri la nuntempa muzik-oferto en Esperanto?

Verdire, mi tre novas en Esperantujo. Sekvi la muzikon kaj la novaĵojn mi faras ekde monatoj. Do, se mi parolas pri la kompaktdiskoj, kiujn oni ricevas en la Esperanto-centro, mi povas trovi diversajn kaj multajn interesajn stilojn. Mi certas, ke iuj el ili apartenas al la nuntempa muziko kaj ke ili estas tre laŭmodaj. Gravas konscii, ke por

nuntempa danco, ĉiu ajn muzik-stilo povas validi, ĉiam se al vi tio utilas por sukcese transdoni klarsenton.

JA:

Vi instruis plurajn studtemojn en diversaj lernejoj. Kio allogis vin al instruado, kaj kiel vi vidas la mision de instruisto?

Bufff... NIGRA. Ekde junaĝo al mi plaĉis instrui. Sed kiam vi vidas la realaĵon, kiam vi estas konscia, vi pensas ali-maniere. La studentoj ne estas kiel antaŭe, ili nun havas multe da rajtoj (tio tre gravas) sed multaj el tiuj rajtoj kontraŭas al la eduk-sistemo. Do, oni ne povas instrui sen timi pri la gepatroj. Jam estas akceptita realaĵo kaj saĝnas ke tio ne ŝanĝigos. Sed poste, al mi tre plaĉas mia laboro. Mi kiel instruisto ne ŝatas librojn. Mia propra maniero por ekspliki ion ne bezonas tekstojn kaj mi tre surpriziĝas kiam miaj lernantoj bone sukcesas en ekzamenoj.

JA:

Kian rolon devus kaj povus ludi arto (en plej vasta senco) en la Esperanto-komunumo?

Interese. Kiam mi ne komprenas kanzonon kaj al mi tre plaĉas, mi ŝercas la tekston kaj memoras ĝin.

Se al iu plaĉas


Esperanto-kanzono,

tiu memoros ĝin. Povas esti la komenca stimulo por lerni. Poste, kompreneble, oni ne lernas lingvojn dancante. Sed ĝi povas esti stimulo por lerni. Imagu ke mi, kiel danc-instruisto enspezas 50 eŭrojn monate de ĉiu lernanto, sed mi permesas ke oni pagu 10-15 eŭrojn se ili faras unu-du Esperanto-lecionojn semajne kun Esperanto-grupo. Eble ĝi povas esti mia propra alvoko por novaj esperantistoj. Do, same kiel danco, ekzistas aliaj diversaj lecionoj: sporto, muziko, pentroarto, ktp...



JA:

Dankon pro la intervjuo!



LEGU kaj ĜUU

LEGU LIBROJN – PREMIOJ – KONKURSOJ

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka

ul.Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin,

Pollando

malgosia.junaamiko@gmail.com



En la urba biblioteko de mia loĝurbo, sur muro pendas la jena surskribo: LIBRO ĈIAM ESTAS LAŬMODA. Mi estas scivola ĉu vi konsentas kun tiu aserto? Nuntempe libro devas konkuri jam ne nur kun la televido kaj radio, sed ankaŭ kun interreto kaj kun aliaj teknikaj novaĵoj. Pluraj homoj opinias, ke la legado de libroj estas malnovmoda okupo nur de maljunuloj. Sed homoj multe legantaj estas pli trankvilaj, pli paciencaj kaj pli toleremaj, kaj la etoso en la hejmo en kiu troviĝas multaj libroj, estas plena je ekvilibro, harmonio kaj erudicio.

Ĉu vi konscias pri la profitoj kiujn alportas al ni valoraj libroj? Legante, ni ne nur ekkonas la modelon de agado, sed ni lernas la nepre bezonatan scion pri la vivo kaj estimado de alia homo. Travivante la problemojn de rolantoj, ni ekkonas la emociojn kaj reciprokajn interhomajn rilatojn. Ni lernas empatian kaj la plej grandsignifajn valorojn en la vivo.

Laŭ mia opinio, libro estas unu el niaj plej grandaj amikoj, sed, domaĝe, multaj el ni ofte identigas ĝin kun la tedaj lernejaj legadoj. Mi plene konsentas kun la konstato de la forpasinta avangarda pola poeto Józef Czechowicz:

*"Kiu legas – tiu vivas multfoje, sed kiu, male, kun libroj
ne volas interrilati, tiu estas kondamnita al unu vivo."*

Kaj kion vi pensas?

KLUBO de BONA LIBRO

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekz. toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo, sendu al la supra adreso aldonante la noton: Biblioteko de Juna Amiko. Vi trovos la rekomenditajn proponojn en la paĝaro de la pola sekcio. Iru al www.ilei.pl kaj klaku la butonon *Juna Amiko*.

Rekomendo: Por la *Biblioteko de Juna Amiko* mi rekomendas la libron *Renkontoj kun Diferenculoj* de Przemysław Paweł Grzybowski. La libro konsistas el 17 riĉe ilustritaj rakontoj, kiuj instruas estimi individuajn diferencojn, toleremon, konvinkon pri nepreco konatiĝi kun aliaj homoj antaŭ ol oni kreas propran opinion pri ili kaj pritaksos ilian agadon.

La ĉefa heroino de ĉiuj rakontoj estas kelkjara knabineto, kiu nomiĝas Kamila. Kun helpo de sia avo – esperantisto – ŝi konatiĝas kun diferenculoj: malsanuloj, maljunuloj, handikapuloj, personoj praktikantaj diversajn religiojn kaj apartenantaj al fremdaj nacioj kaj kulturoj, ktp. La personoj karakteriziĝas per diferencaj vivostiloj kaj perspektivoj, kaj ilian nuntempan viv-situacion influis iamaj okazintaĵoj. Kamila konsciiĝas, ke ne ĉiuj homoj en la mondo estas identaj, sed ĉiuj estas egale gravaj kaj ĉiuj meritas la amikecon, amon kaj estimon. Ŝi lernas, ke oni ne devas krei propran opinion aŭ pritaksi iun ajn antaŭ ol oni ekkonas sin kiel alian personon.

Mi rekomendas la libron precipe kiel bonan legaĵon en familia rondo, ĉar ĝi evoluigas sentemon por alia homo kaj kunportas valorajn ekzemplojn de rilato al homfrato.

La libro *Renkontoj kun Diferenculoj* de Przemysław Paweł Grzybowski estas proponita al la konkurso de la literatura retejo en la kategorio: „La libro por infanoj”.



Przemysław Paweł Grzybowski estas doktoro pri pedagogio, instruisto en la Universitato de Kazimierz Wielki en Bydgoszcz (Pollando). Li interesiĝas pri interkultura kaj kompara pedagogioj, estas volontulo en internacia movado de doktoroj-klaŭnoj de Patch Adams. Li vojaĝas tra la mondo kiel instruisto de Esperanto, preleganto, ĵurnalisto kaj tradukisto. Li volante respondis mian demandon:

– *Kio instigis vin verki la rakontojn?*

– Mi ĉiam deziris verki libron por infanoj. Kiel instruisto kaj volontulo en hospitalo mi plurfoje laboris kun infanoj kaj konstatis, ke ili ŝategas travivadi aventurojn priskribitajn en libroj. Kiel pedagogo mi estas konscia, ke mankas libroj, kiujn oni povus utiligi kiel pretekston por diskuto kun infanoj pri ‘malfacilaj’ temoj. Do, la ideo de la libro ĝermis jam de kelkaj jaroj, sed ĝi plene realiĝis danke al Lucyna Fic, kiu estas handikapita pentristino. Iam mi renkontis ŝin kaj babilante eksciis pri ŝia revo illustri infanlibron. Tiamaniere du revoj realiĝis, ni kune preparis belan libreton, ricevis pozitivajn recenzojn de fakuloj pri edukado kaj psikologio. Skipo de la eldonejo *Impuls* pene redaktis la libreton kaj zorgis pri ĉiuj teknikaj problemoj kaj jen nun multaj infanoj kaj plenkreskuloj povas legi nian kreaĵon...

EKKONU MIAN LANDON PERE DE ĜIA LEGENDO – KONKURSO ne nur por junaj legantoj

Hodiaŭ mi proponas al vi viziti la eŭropan landon Kroatio. Ĝi estas la patrujo de mia amiko Josip Pleadin (kroata E-aktivulo, E-instruisto, ĵurnalisto, eldonisto, tradukisto, kreinto de DEC kaj poeto), kiu helpis al mi prepari la legendojn kaj informojn pri sia lando.

Ĉu vi scias kial Kroatio estas unu el la plej belaj landoj? Ekzistas legendo ke Dio, kreinte la mondon, forgesis pri Kroatio, sed iu kroato demandis Lin kie estas lia lando. Tiam Dio donacis al li la plej belan pecon de la Tero, kiun Li intencis konservi por si mem. Nun konatiĝu kun kelkaj informoj pri Kroatio. Klopodu trovi la menciitajn lokojn sur la mapo, kaj poste tralegu la legendojn kaj faru konkursajn taskojn.

Kroatio, kroate nomata *Hrvatska*, estas lando en sudorienta Eŭropo, ĉe Adriatika Maro kaj sur Balkana duon-insulo, kiu okupas ĉirkaŭ 56.610 km². Laŭ sia formo ĝi similas renversitan literon V, bumerangon, flugantan birdon aŭ drakon. Kroatio en la sudo najbaras kun Bosnio kaj Hercegovino, oriente situas Serbio, norde Hun-gario, okcidente Slovenio, kaj sudoriente Monte-negro. Ĝia sud-okcidenta parto estas belega mult-kilometra bordo de la Adriatika Maro ornamita per dissemataj, ĉarmaj insuloj. Kroatio posedas 1185 insulojn kaj insuletojn, sed nur 66 estas loĝataj. La mara akvo en Kroatio estas kristale travidebla. Videblas la marfundo eĉ en profundeco de dekelke da metroj, kaj la impresoj dum observado de la subakva mondo estas vere nekutimaj. Sendepende pri tagparto oni povas admiri ankaŭ la belecon de apudmaraj golfetoj kaj sovaĝaj strandoj, troveblaj tra la tuta marbordo. Kroatio estas la lando, kiu havas ne nur la pitoreskan marbordon, sed ankaŭ variajn aliregionajn pejzaĝojn, volvitajn per mistero de grandiozaj historiaj restaĵoj, ĉarmajn urbojn kaj urbetojn kaj nekutime interesajn lokojn kiuj ebligas senperan interrilatadon kun la historio.

La nordan kaj nordorientan regionojn de la lando formas parto de Panonia ebenaĵo nomata Slavonio. Ĝi estas grenejo de Kroatio, fama pro sia fekunda grundo. La sudan kaj okcidentan regionojn karakterizas montara pejzaĝo. Temas pri dinaridaj montaroj, en kies montaro Dinara, troviĝas ankaŭ la plej alta montopinto de Kroatio - Vrh Dinare (nomata ankaŭ Sinjal), kiu havas 1.830 metrojn. La montaron Dinara karakterizas karsto, en kiu oni povas admiri karstajn fenomenojn kaj naturajn skulptaĵojn. La klimato de Kroatio estas mediteranea ĉe la marbordo, montara en la meza parto kaj kontinenta en la panonia regiono.

La lando administre konsistas el 20 distriktoj, 127 urboj kaj 429 komunumoj. La ĉefurbo de la lando estas Zagrebo, ekonomia, politika, administra kaj kultura centro de Kroatio. Kroatio en 1995 post la t.n. Patrolanda milito pene sukcesis akiri sian suverenecon kaj sendependecon. La nacia lingvo estas la kroata kaj la oficiala monunuo estas kunaio, kiu egalas al 100 lipaĵoj.

En Kroatio estas kelkaj heredaĵoj deklaritaj de UNESKO: la Episkopa Komplekso de la Eŭfrazia Baziliko en Poreč, la katedralo de Sankta Jakovo en Šibenik, la historia grandurbo de Trogir, la kampo de Starigrad en la insulo Hvar, la ŝtonaj remparoj de Dubrovnik, la historia komplekso de Split kun la Palaco de Diokleciano kaj la Nacia Parko Lagoj de Plitvice.



Kroatio famas ankaŭ pro bongustegaj manĝaĵoj. La kroata kuirarto estas tre varia, konsistanta el diversaj gustoj kaj aromoj. La manĝaĵojn oni preparas el la plej freŝaj ingrediencoj: legomoj, fiŝoj kaj viandoj, kaj manĝas en surbordaj restoracioj kun malferma vidaĵo al la maro.

Kroatio estas ankaŭ favora lando por Esperanto. En Zagrebo jam dufoje okazis Universalaj Kongresoj de Esperanto (la 38-a en 1953 kaj la 86-a en 2001). En 1988 okazis tie la 44-a Internacia Junulara Kongreso, en 2001 la Internacia Infana Kongreseto, kaj en 2005 la 78-a Kongreso de SAT.

Kroatio estas ankaŭ la lando de nekutime gastemaj, amikaj kaj ridantaj homoj, kies kanzonoj je la unua momento katenas la koron de ĉiu aŭskultanto. Ĉi tie dum jarcentoj interpuŝiĝis influoj de multaj kulturoj, pro kio ĉiupaŝe oni sentas bloveton de la historio, kvazaŭ oni vizitus samtempe kelkajn lokojn en la mondo. Tial nepre vizitu Kroation kaj mem konvinkiĝu pri ĉio dirita, eksentante en via koro iom el la escepta karaktero de ĉi tiu lando kaj admirante ne nur la antikvaĵojn, sed ankaŭ la belecon de la naturo.


[La mapo estas prenita el la Esperanta vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/wiki/...>]

LEGENDOJ

Post kiam vi jam iom ekkonis Kroation, tralegu ĝiajn belajn legendojn. El ili vi ekscios kiel ekestis la kroata blazonon kaj kial loĝantoj de Ĝurĉevac portas la kromnomon Kokoj.

La blazono de Kroatio

La blazono de Kroatio estas ŝildo kun ŝaktabula formo, konsistanta el 13 ruĝaj kaj 12 blankaj kampoj. Super la ĉefa ŝildo estas kvin malgrandaj ŝildoj, kiuj reprezentas la historiajn regionojn ene de Kroatio: Dalmatio, Dubrovniko, Istrio, kaj Slavonio. Laŭ la legendo la blazono ekestis en la deka jarcento, kiam la kroata reĝo Stjepan Držislav, fariĝinte milit-kaptito de la venecia doĝo Pietro la Dua, ŝakludis kun li. La ĉefa premio estis libero de la reĝo. La reĝo venkis en tri sinsekvaj partioj, kaj tiumaniere regajnis sian liberecon (aŭ, laŭ alia versio, la regpovon super la dalmatiaj urboj). Ekde tiu momento la ŝaktabulo fariĝis la blazono de Kroatio.



[La blazono estis prenita el Vikipedio http://pl.wikipedia.org/wiki/Herb_Chorwacji]

Legendo pri 'Kokoj'

En norda Kroatio situas negranda urbeto Ĝurĉevac (Urbo de Sankta Georgo), kies loĝantoj portas la kromnomon 'Kokoj'. La nomo devenas el la 16-a jarcento, kaj pri ĝi ekzistas tre interesa legendo. En tiu tempo turkoj atakadis Eŭropon kaj okupadis urbon post urbo. La sola neokupita fortikaĵo en tiu paro de la lando restis Ĝurĉevac. Malantaŭ la fortikaj muroj kaŝis sin la defendantoj kaj la popolo el la vilaĝo nomata 'Sancti Georgii'. Ĉar la unuaj atakoj montris ke la defendantoj ne cedos, la turkoj ruze eksieĝis ĉirkaŭ la urbo, atendente ke la malsato venku anstataŭ ili. Baldaŭ en la fortikaĵo ekmankis nutraĵoj, kaj restis nur unu malgranda koko. Se oni formanĝus la lastan kokon, neniu satiĝus, kaj la urbo tamen kapitulacus. Iu saĝa maljunulino konsilis al la urba kapitano, ke oni metu la lastan kokon en la kanonon kaj elpafu ĝin al la turka tendaro. Dirite - farite! Kiam la elpafita koko falis antaŭ la turkan Ulama-bejon, li ekmiris, pensante ke la defendantoj primokas lian naivecon, ĉar ili havas multege da nutraĵoj. La kolera bejo decidis forlasi la urbon nekonkeritan, kaj kiel sian malbenon lasis al la defendantoj la nomon 'Kokoj' (en la loka dialekto 'Picoki'). Male ol la bejo deziris, nuntempe la loĝantoj de tiu malgranda urbo fiere portas sian kromnomon, kaj ĉiujare, la lastan semajnfino de junio, prezentas la

sieĝon de sia fortikaĵo sur la ekstera scenejo. Tiu legendo fariĝis la unua nemateria heredaĵo de Kroatio, kaj en 2012 ĝin spektos ankaŭ la partoprenantoj de la jubilea 10a kongreso de kroataj esperantistoj okazonta en Koprivnica, inter la 22a kaj 24a de junio. Venu kaj ĉeestu la historian eventon!

La konkursa tasko estas la jena: Kreu demandojn rilate la informojn kaj la legendojn pri Kroatio.

La konkurso taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko 'Konkurso – legendo' ĝis la 30a de aprilo 2012 al la adreso, kiun vi vidis supre.

PROVERBOJ

Finante la rubrikon mi enmetas kelkajn proverbojn. La **proverboj** estas mallongaj kaj facilaj frazoj dank' al kiuj oni pli bone esprimas iajn ideojn, avertojn, admonojn aŭ instrukciojn. Ili estas gravaj en ĉiu lingvo kaj tial por perfektigi vian konon de Esperanto necesa estas lerni ankaŭ proverbojn.

Tempo estas mono.

Mensogoj havas mallongajn kruojn.

Sen laboro ne estas manĝaĵo.

Homo planas, Dio decidas.

Kie fumo leviĝas tie fajro troviĝas.

Pomo neniam falas for de la arbo.

Unu hirundo printempon ne alportas.

En sana korpo sana spirito.

Vortklarigoj

Empatio: La kapablo imagi kiel sentas proksimuloj.

Sieĝi: Ĉirkaŭi kastelon aŭ urbon per armeo, tiel ke manĝoj, akvo kaj varoj ne povu eniri.

Karsto: Kalkŝtona montara regiono, kie abundas kavernoj.

Bejo: Turka distrikta estro.

GAJNINTOJ:

En la 2-a numero 2011 la unuan premion kune gajnis **Juan Carlos Triana Alfonso** kaj **Marcos Antonio Alzogaray Martinez** el Kubo kaj en la 3-a numero 2011 la unuan premion gajnis **Jindřiška Drahotová** el Ĉeĥio.

Mi kore gratulas al ĉiuj partoprenintoj de la konkurso kaj al la gajnintoj konsilas tralegi la valoran kaj bele eldonitan premion, la libron *Reĝo Maĉjo la Unua* de Janusz Korczak, esperantigitan de Tomasz Chmielik kaj kun lia aŭtografo.

La libran premion fondis la pola sekcio de ILEI.



Interkultura



Rubrikestro: Elena Nadikova,
E-klubo „Betuleto”,
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio.

Ĉu vi iam pripensis, karaj legantoj, kiel komenciĝas amikeco? En unu fama rusa porinfana kanteto oni kantas: ‘Amikeco komenciĝas je rideto’. Malfacilas disputi pri tio. Sed se homoj loĝas malproksime unu de la alia kaj ne povas vidi ridetantan vizaĝon de sia interparolanto? Tiam helpas ... Esperanto!

Do, estas du elementaj lernejoj, kie studas 10-12-jaraĝaj infanoj. Ili loĝas en diversaj landoj, parolas en malsamaj lingvoj. Kiel ĉiuj infanoj, ili ŝatas ludi, babili kaj gaje pasigi la tempon kun siaj amikoj. Unu lernejo estas la alternativa baza lernejo ‘Onddod’, kiu situas en la Korea Respubliko, en ĝia ĉefurbo Seulo. La dua estas eksperimenta elementa lernejo en la urbo *Pingtung* en Tajvano. Tiuj geografiaj nomoj jam estas konataj al niaj legantoj, ĉu? En la numero 2006/1 de *Juna amiko*, ni rakontis pri la Esperanto-kurso de Reza Kheirkhah en la mezalta lernejo *Pingrong* en Tajvano por 24 studentoj. Reza estas la instruisto de la angla lingvo kaj sperta esperantisto. En 1989 li volontulis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, Nederlando.

Nun Reza instruas Esperanton en du lernejoj: en la sama mezalta lernejo *Pingrong* por 27 studentoj kaj en la elementa lernejo, kiun frekventas lia filino Ailin – al la 14 lernantoj de 5-a kaj 6-a grado [10-12-jaraĝaj infanoj – E.N.]. (Krome ke li instruas ankaŭ la anglan lingvon al pli ol 500 studentoj!)

Do, julie 2011 Reza ricevis la leteron de sia longdaŭra korea amiko Lee Jungkee, kiun oni karese nomas Ŝlosilo (ĉar li kapablas solvi ĉiujn problemojn de eksterlandanoj, kiuj vojaĝas al lia lando). En la letero estis skribite, ke grupo de koreaj lernantoj volas veturi al *Pingtung* por renkonti tajvanajn samideanojn – lernantojn, kiuj ankaŭ lernas Esperanton kaj volas praktiki ĝin.

Ambaŭ flankoj rapide interkonsentis pri la renkontiĝo. Tamen decidi – ankoraŭ ne signifas fari. Jen kion rakontas Reza, unu el la organizantoj: “Mia unua reago ĉe mi mem estis: tia vojaĝo simple ne eblas. Ĉar, unue, ne estas samaĝaj geknaboj ĉe mia urbo kiuj parolas Esperanton, krom Ailin – mia 11-jara filino. Due, kvankam mi estas la membro de Pasporta Servo, mi neniam akceptis tiom grandan grupon”.

Tamen, diri NE al la amiko ne eblas! Reza Kheirkhah kaj Lee Jungkee estas bonaj amikoj. Ili konatiĝis en Nederlando en 1989. Kaj poste ofte renkontiĝis en la Korea Respubliko. Do, necesas realigi la planon. Por tio Reza devis unue krei kurson de Esperanto por elementaj lernantoj, kiuj estus samaĝaj, kiel la koreanoj. Reza proponis la aferon al la lernejo de Ailin kaj oni favore akceptis malfermi kurson. Tiu lernejo apartenas al la Ministerio pri Edukado kaj estas modela lernejo por aliaj lernejoj. La cirkonstanco, sendube, estas bonŝanca por la Internacia lingvo. Ja tia kurso unuafoje okazas en elementa lernejo en Tajvano!

En oktobro ĉiuj lernantoj preparis leterojn kaj sendis ilin al la korea lernejo. La leterojn akompanis fotoj de iuj lernantoj, poŝtmarkoj, kaj eĉ unu metis malgrandan moneron en la koverton! Post kelkaj semajnoj la respondoj venis el Seŭlo. En la pako estis, krom la leteroj de la lernantoj, fotoj de ĉiuj kaj ankaŭ estis disko, en kiu troviĝis la kanto de la lernejo. La leteroj tre impresis la lernantojn en Tajvano kaj ili komencis pli serioze lerni Esperanton!

Dume, tajvanaj esperantistoj en *Pingtung* preparis la restadon por la koreanoj. Kvankam laŭ la originala plano ili devis tranokti en hotelo, kaj nur unu nokton sperti hejman tranokton ĉe iu esperantisto alterne, tamen finfine oni decidis, ke ĉiujn kvar noktojn ili restu ĉe hejmoj de lokaj esperantistoj. Tri gastigantoj pretis akcepti ok koreajn gastojn.

Do, finfine venis la dato, kiam la koreaj gastoj atingis Tajvanon – la 2an de decembro 2011. Memorinda tago! Ok koreaj esperantistoj – kvin geknaboj kaj tri plenaĝuloj flugis al *Kaohsiung*, la proksima urbo al *Pingtung*. Estis jam preskaŭ noktomezo, tamen sep tajvanaj samideanoj en 4 aŭtoj pacience atendis siajn gastojn. La unua celo estis la hejmo de Reza, kie ĉiuj koreanoj kaj iuj lokaj esperantistoj kunvenis por trinkado, interkonatiĝo, sinprezento kaj iom da preparo pri la restado.



Konatiĝu ankaŭ ni kun ili. Tajvanaj gastigantoj: Reza kaj lia filino Ailin, Kevin, Dancina, Ingrid, Rico kaj Ĉevalo. Koreaj gastoj: s-ro Lee Jungkee, instruistino Subira kaj s-ro Radiko, Ĉielo, Ĉefo, Bluo, Akvo kaj Klara.

La duan tagon, la 3an de decembro, frumatene, ĉiuj ekis al la bela regiono Kenting per buso, en kiu kolektiĝis ĉirkaŭ 40 esperantistoj kaj iliaj familioj. Veturante al la regiono, oni mikrofone sinprezentis kaj konatiĝis unu kun la alia. Inter la ĉeestantoj estis eminenta esperantisto, la profesoro Manlai (konata kiel Manlajo), kiu prizorgas la retejon <lernu.net> por ĉinoj. En *Kenting*, fama pro tre bela marbordo, ĉiuj plene ĝuis la gigantan akvarion, en kiu naĝas nekredible diversaj fiŝoj, iuj tre grandaj, kaj kreskas riĉaj maraĵoj. Inter diversaj maraj bestoj estis ankaŭ pingvenoj, kiujn oni ne povas vidi en tropika Tajvano. Laŭ la impresoj de la partoprenantoj, estis tre agrabla turismo kun freŝa maretoso. Reveninte de la ekskurso, en la hejmo de Reza okazis festo por Subira, kies naskiĝtago hazarde ĝuste okazis tiutage. Ĉiuj gratulis ŝin kun granda kuko kaj kanto, eĉ pluraj donacoj. Estas surprise por la koreaj gastoj, ke Reza kaj la samideanoj de *Pingtung* silente kaj nerimarkeble aranĝis la feston, en kiu oni kantis naskiĝtagan kanton en Esperanto, ĉine kaj eĉ koree, pri kio tajvananoj antaŭe praktikis!

La sekvan tagon, la 4an de decembro, okazis Zamenhofa Festo. Matene la partoprenantoj vizitis la folkloran ‘*Hakka* vilaĝon’. Estis tre bona okazo por senti la iaman kulturetoson de la popolo *Hakka*, kies radikoj estas en la sudo de Ĉinio. Tagmanĝinte en la vilaĝo, ĉiuj vizitis la domon de s-ino Flora, kies edzo Mobo estas eksa piloto, kiu iam



lernis Esperanton. Regalite de la geedzoj per bongustaj teo kaj fruktoj, la partoprenantoj direktiĝis al la Zamenhofa festo en la Komunuma Universitato.

Danke la E-instruado de Reza, la esperantistoj de Pingtung povis lui iom luksan klasĉambron por la festo. La festaj programoj estis buntaj: ‘Kio estas Esperanto?’ fare de Kevin, ‘Mia vojaĝo tra Koreo’ fare de Dancina, ‘Mia profesia Esperanto-vivo’ fare de Lee Jungkee, ‘Korea Respubliko – nia najbara lando’ fare de la profesoro Abengo, ‘Prezento de korea elementa lernejo’ fare de Subira kun sinprezento kaj kantado de kvin koreaj geknaboj, ‘Aerobiko-praktiko’ gvidata de Chen Yawen, kaj kelkaj komunaj kantoj. Kvankam la urbo estas eta, la Zamenhofa festo estis tre enhaviĉa kaj kortuŝa. S-ro Lee Jungkee eĉ kuraĝe diris, ke la urbo *Pingtung* estas la ĉefurbo de la Tajvana Esperantujo!

La 5an de decembro venis la tago de la “renkontiĝo kun multaj batantaj koroj”, laŭ la impresoj de Reza. Koreaj gastoj vizitis la lernejon kun kiu jam ili

korespondadis. Ĉe tiu lernejo oni povis vidi ŝildon digitecan sur kiu oni bonvenigis koreanojn. En granda ĉambro koreaj kaj tajvanaj infanoj kolektiĝis. Estis komence malfacile decidi kion fari. Infanoj de ambaŭ flankoj estis hontemaj (jen azia karaktero!) kaj necesis tempo por degeligi la glacieron inter ili! Unue koreanoj komencis sinprezenti kun ĉina interpreto. Poste Tajvanaj lernantoj faris same. Ili devis fari tion per legado el papero malkiel la koreanoj. Preskau ĉiu ne volis veni antaŭen unue kaj ne tiom frue! Fine infanoj de ambaŭ grupoj komencis iom babili kune: unue per helpo de interpretistoj de ambaŭ flankoj kaj poste mem komencis iom da komunikado. Venis tempo por interŝanĝo de donacoj. Koreanoj portis belajn malgrandajn koreeskajn aĵojn, kiel libromarkiloj, pupetoj, bombonoj kaj skribaĵoj. Tajvananoj donacis belajn lerneajn glasojn. Kiel rimarkigis s-ro Lee Jungkee: “Fakte estas unika kaj rara renkontiĝo en Esperantujo, se paroli pri element-lerneja kampo”. Adiaŭinte la lernejon, la koreaj gastoj vizitis la mezaltan lernejon *Pingrong*. En la lernejo okazis agrabla renkontiĝo kun tieaj Esperanto-lernantoj. Kaj malgraŭ la malsama aĝo de la du grupoj de lernantoj, ili ĝoje kune babilis kaj interŝanĝis donacojn. Feliĉe okazis ebleco renkonti la lernejestron, kiu tre afable traktis la viziton. Krome en la lernejo la gastoj vizitis la bibliotekon kie estas dekoj da esperantaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj.

La lasta tago, la 6an de decembro, estis dediĉita al la vizito al aborigena vilaĝo, proksime de *Pingtung*. Ĝi estis tre unika kaj la arto-prezentado de la loĝantoj donis amuzon kaj vekis scivolemon pri ilia iama kulturo. Kiel kutime por E-renkontiĝoj, okazis en la adiaŭa tago komuna fotado. Ĉiu povis konvinkiĝi, ke kvankam la tempo estis mallonga, aperis ia amikeco inter la du grupoj. Ĝuste tio permesis al la ĉeestantoj plene ĝui la tutan tempon en Tajvano! Sendube, ĉiuj partoprenantoj esperas, ke tiaj renkontiĝoj okazu regule inter du lernejoj. En la fino de la semestro de la Esperanto-kurso en Tajvano, Reza proponis al siaj studentoj skribi impresojn pri la kurso. Evidentiĝis, ke preskaŭ ĉiuj lernantoj skribis ion pri tiu kontakto kaj renkontiĝo kun koreaj infanoj. Por ili tio estis la pinto de la impresoj pri la kurso. Ekzemple, Penny skribis: “Renkonto kun koreoj lasis profundan memoron ĉe mi kaj ĉiuj el ni estis ekscititaj pro konatiĝo kun ili”. Joy jene esprimis sian senton: “Pro mia klopodo en tiu tago kompreni koreanojn kaj paroli kun ili, mi pensas ke mi trovis novan motivon por lernado de Esperanto”.

Pravas Joy! Esperanto estas perfekta ilo por ĉiuj popoloj kompreni unu la alian! La Internacia Lingvo ne scias limojn kaj ĉie naskas amikecon. La antaŭnelonga renkontiĝo inter koreaj kaj tajvanaj lernantoj plene konfirmis tion!

Ni esprimas koran dankon al s-ro Lee Jungkee kaj s-ro Reza Kheirkhah pro la disponigitaj materialoj.

Ta Da! Jen la...

vikio- kivio



Saluton!

Mi flugis tute el Nov-Zelando por konsili al vi pri Vikipedio.

Flugis...!? Flugi? Nu, jes, per aviadilo. Mi bedaŭrinde neniam havis proprajn flugilojn.

Spite tion, kiu pli konvenas paroli pri vikioj ol kivioj?

Eble vi scias, ke kivioj estas noktaj birdoj. Do, perfekte mi taŭgas por *Juna amiko*, ĉar (eble vi scias), tion oni preparas tra la nokto. Mi helpas al mia samlanda redaktoro – mi snufas tra Vikilando (Vikiio !?) kaj trovas interesajn artikolojn.

Snufu kun mi!

Viki, la vikio-kivio!

1. O! Kia diro!

“La edukado estas mirindaĵo, sed nenio sciinda povas esti instruita.”

Kiu diris tion? (Serĉu en la Vikicitaro):

- 1 George Orwell (1903-1950)
- 2 Oscar Wilde (1854-1900)
- 3 Ogden Nash (1902-1971)
- 4 Barack Obama (1961 -)

Tiu sama homo diris: “En ekzamenoj, stultuloj starigas demandojn, kiujn saĝuloj ne kapablas respondi”.

Ĉu vi konsentas?

2. Fama poemo de Zamenhof

Ho, mia kor', ne batu...

- 1 kiel tamburo,
- 2 tiom tempeste,
- 3 maltrankvile,
- 4 miajn pulmojn.

3. Mazaro de l'Mediteraneo

La urbo Mazaro de la Valo (nacilingve Mazara) troviĝas en okcidenta _____, kaj estis fondita de la _____ en la _____ jarcento antaŭ/post Kristo (a.K./p.K.)

- 1 Malto; araboj; 5a jarcento p.K.
- 2 Kreto; grekoj; 5a jarcento a.K.
- 3 Korsiko; romianoj; 2a jarcento a.K.
- 4 Sicilio; fenicoj; 9a jarcento a.K.

Cetere, la vikipedia artikolo pri tiu urbo estas pli ampleksa ol la angla. Eĉ pli cetere, nuntempe en tiu urbo 120 lernejoj studas Esperanton, kadre de Eŭropa projekto, prepare al nacia Esperanta kongreso. ILEI liveras subtene al la lernantoj kelkcentojn da ekzempleroj de *Juna amiko*.

4. Konferenc-urbo de ILEI

En julio 2012 la konferenco de ILEI okazos unufoje en Ĉinio; ĝi okazos en _____, (enloĝantoj __milionoj), en _____ Ĉinio, en la provinco _____.

- 1 Urumĉio, 3 milionoj, nord-okcidenta, Ŝinĝjango.
- 2 Ŝiano, 8 milionoj, mez-okcidenta, Ŝanŝio.
- 3 Haikoŝo, 2 milionoj, sud-orienta, Hajnano (provinco kaj insulo).
- 4 Kunmingo, 5 milionoj, sud-okcidenta, Junano.

5. Kongres-urbo de UEA

En julio 2012 la Universala Kongreso de Esperanto de UEA, okazos en Hanojo, la ĉefurbo de Vjetnamio. Tie okazis la 63a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en _____. En unu jaro, falas tie averaĝe _____ mm da pluvo. La ĉefa rivero, kiu fluas tra la urbo estas la _____ Rivero. La nomo de la pagodo en la bildo estas _____.

- 1 2007, 1680mm, Ruĝa, *Tran Quoc*.
- 2 2002, 1480mm, Flava, *Dong Kinh*.
- 3 1997, 1280mm, Blua, *Thang Long*.
- 4 1992, 1080mm, Verda, *Dong Quan*.

6. Afriko al la vico

Jen la dua plej granda kaj homplena kontinento. Ĝi plej longa rivero (6671km) estas la _____; ĝia plej granda lago estas _____. Ĝi nuntempe entenas _____ sendependajn ŝtatojn. Ĉ. ____% de la kontinenta loĝantaro vivas per malpli ol unu dolaro tage.

- 1 Limpopo, Tanganjiko, 34 ŝtatoj, 20%
- 2 Zambezo, Malavio, 44 ŝtatoj, 35%
- 3 Nilo, Viktorio, 54 ŝtatoj, 50 %
- 4 Nigero, Ĉado, 74 ŝtatoj, 70 %

7. Pasaĝeraj aviadiloj

La momente plej granda estas:

- 1 Boeing Jumbo (747)
- 2 Boeing Dreamliner (787)
- 3 Ilyusin 86
- 4 Airbus A380



Jen helpiloj por viaj esploroj!

http://eo.wikipedia.org/wiki/Mazara_del_Vallo
[http://eo.wikiquote.org_\(Vikicitaro\)](http://eo.wikiquote.org_(Vikicitaro))
<http://www.ilei.info>
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Hanojo>
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Afriko>
http://eo.wikipedia.org/wiki/Ho,_mia_kor'
http://eo.wikipedia.org/wiki/Airbus_A380
http://eo.wikipedia.org/wiki/Boeing_787

En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, el-stara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi plenformita, celkonscia esperantisto.

34 *La rekordulo de nia literaturo*

István Nemere (naskita en 1944) estas profesia verkisto de romanoj en du lingvoj, sia gepatra hungara kaj Esperanto. En la hungara aperis de li preskaŭ 200 libroj, kaj en Esperanto ĝis nun 19 romanoj kaj kelkaj noveloj, kio faras lin rekordulo

de la Esperanta rakonta literaturo. Laŭ informo, liaj verkoj estis tradukitaj en almenaŭ dekon da lingvoj. Li estas ankaŭ produktema tradukisto el la pola lingvo en la hungaran.

Kiel junulo Nemere laboris interalie pri sekcado en kadavrejo kaj pri flegado en medicina urĝejo. Li loĝis en Pollando dum ses jaroj, kie li laboris interalie kiel interpretisto. Li edziĝis al pola esperantistino, probable li lernis Esperanton en tiu tempo. Post lia reveno al sia patrujo en sia trideka jaro, komenciĝis lia verkista okupiĝo. Sian unuan hungarlingvan libron li aperigis en 1974. Tio estis la komenco de lia kariero kiel verkisto en tiu lingvo. La senĉeso de lia produktado de romanoj en la hun-

gara klare indikas, ke liaj verkoj estis favore akceptata de la hungaraj leg-

BILDOJ EL LA HISTORIO

antoj. Sed Nemere ne estis kontenta esti enfermita en lingvo, kiun malmultaj konas ekster Hungarujo. Li serĉis internacian legantaron. Jam lerninte Esperanton li tial decidis uzi sian talenton por verki en la internacia lingvo. Tiu decido pruviĝis bonfara por la proza literaturo en Esperanto kaj la rezulto daŭre pretas servi kiel instrua ekzemplo por verkemaj aspirantoj.

La unua Esperanta libro de Nemere aperis en 1981, novelaro titolita *La naŭa kanalo*. Ĝi enhavas 31 novelojn de diversa longeco. Tiuj unuaj provoj, kvankam diversnivelaj, estis gratulindaj aldonoj al la maldensa vico de Esperantaj prozverkoj. Tio pli definitive pruviĝis per la unua ro-

mano de Nemere, *La fermita urbo*, kiu aperis en la posta jaro. Jam en la menciita novelaro konstateblas lia inklinio al scienc-fikcio, kaj lia unua romano estas precize tia.

Ĝia okaz-tempo estas la dudeksesa jarcento, la ĉefpersono trovas urban kaŝitan, kie la homoj vivas laŭ mezepokaj kondiĉoj, kaj kie li trapasas ekscitajn aventurojn. La

post metro. Li ne aŭdis jam eksteran venton; ega silento regis. Lia korpo foje-foje turniĝis, sed en la lumo de la lanterno li vidis ĉie nur grizan betonon. Li perdis sian temponenton, sed li rigardis la horloĝon. Trankvile li descendis plu.


La listo de la romanoj de István Nemere estas longa, li certe tenas

LITERATURO DE LA ESPERANTA

rakonta stilo estas konciza, la agado ĉiam havas la ĉefan rolon kaj facile kaptas la atenton de la leganto. La romano estas unuavice distra legaĵo kaj atestas pri la profesia tekniko de la aŭtoro en kreado de okazara rakont-fadeno, kiu facile tenas vigla la intereson. Tiaj libroj estas ja bonvenaj al junaj Esperanto-legantoj kaj meritas ĉian laŭdon. Kaj certe junaj verkistoj povas multon lerni de lerte uzata rakonta tekniko. Jen mallonga ekzemplo: Mark, la ĉefpersono, malsupreniras profundan ŝakton por esplori suban misteron:


Suben rigardante, Mark vidis nigran malplenen. La lanternon li hakis al sia brusto, la ŝnuregon laŭbezzone lasis fali suben, metron

rekordon inter Esperantaj proz-verkistoj. Ofte du libroj aperis samjare, *La blinda birdo* kaj *Sur kampo granita* en 1983, *Febro* kaj *La monto* en 1984, *Serĉu mian sonĝon* kaj *Terra* en 1987, tiel oni povas elnombri la 22 romanojn ĝis *Jesa* kaj



Serpentoj en la puto en 2009. Nu, tre povas esti, ke iuj el liaj Esperanto-romanoj estas liaj propraj tradukoj de liaj hungarlingvaj romanoj, sed tio neniel malgravigas lian statuson kiel Esperanto-verkisto. Jam pli ol tridek kaj duonon da jaroj Nemere ne ĉesis mirigi la Esperantistan legantaron per sia produktado, sed li meritas pli ol primiron, li meritas senrezervan admiron. Ni esperu, ke Nemere ankoraŭ longe daŭrigos provizi siajn admirantojn per pliaj mens-okupaj verkoj.

Baldur Ragnarsson



KVIZO-LUDO

Prizorganto de la rubriko: *Dieter Berndt, Germanio*

Karaj kvizemuloj,

Jen la jarkomenca dekopo de kvizotaskoj. Fideluloj certe partoprenos. Estus tre bone, se ni povus bonvenigi novajn partoprenantojn. Deziras al ĉiuj agrablan amuziĝon kaj sukcesajn solvojn via

Dieter Berndt

N-ro 2012/1 (Limdato: la 1a de junio, 2012)

1	Korektu la frazojn: a) Plej malnova membro de nia grupo morgaŭ festas lian 50-an naskiĝtagon. b) Li diros al mi, ke li certe venas sabato je la 6-an horon. c) La knabinoj ridis, ĉar ŝi estas gajaj.
2	Nomu kvin fruktojn, kiujn vi ŝatas manĝi. Ĉiu havu alian komenc-literon.
3	Esprimu la substrekitajn vortojn per unu vorto: a) Eŭropo estas unu el la kvin <u>partoj de la mondo</u> . b) Hundo estas besto <u>kun kvar piedoj</u> . c) Mi atendas lin antaŭ la <u>pordo de la domo</u> .

4	Decidu, kie uzi –foje, -oble, -ope. a) Ni veturis tri...al Parizo. b) Mi estis tie jam tri... c) Ĉio tie kostis tri... pli ol aliloke.
5	Ĉe tiuj vortoj intermiksiĝis la literoj. Rearanĝu ilin: TUDESTO, MENATO, SAMENJO, KLIKUNO
6	Klarigu jenajn vortojn: legendo, turisto, surprizo, ruino, febro.
7	Ŝerca demando: Kiam diras franco: „Bonan matenon“?
8	Kion vi farus, se vi gajnus 100 000 eŭrojn? Skribu almenaŭ 6 frazojn
9	Nomu kvar urbojn kun la komenca litero B, en kiuj okazis UK de Esperanto.
10	Kion vi scias pri la urboj, kiujn vi nomis ĉe numero 9 ?

La solvojn sendu rete aŭ papere al s-ro *Dieter Berndt* (esperanto-berndt@web.de)
Berolinastr. 2, DE-10178 Berlin, Germanio. Se vi havas demandojn, turnu vin al li,
kiu volonte informas pri detaloj.

Rezultoj de la kvizo 3/2011

Ni elkore dankas kaj gratulas ĉiun konkursanton!

- | | | | |
|----|----------------------------|----|------------|
| 1. | <i>Jindriška Drahotová</i> | CZ | 17 poentoj |
| | <i>Blanka Hužerová</i> | CZ | 17 poentoj |
| | <i>Maria Molnár</i> | HU | 17 poentoj |
| 4. | <i>E.E. Popoviciu</i> | RO | 16 poentoj |

Rezultoj de la kvizoj de 2011


- | | | | |
|----|----------------------------|----|------------|
| 1. | <i>Maria Molnár</i> | HU | 59 poentoj |
| 2. | <i>Blanka Hužerová</i> | CZ | 55 poentoj |
| 3. | <i>Jindriška Drahotová</i> | CZ | 53 poentoj |
| 4. | <i>E.E. Popoviciu</i> | RO | 52 poentoj |

Jen la solvoj de la lasta kvizo (3/2011)

- diversaj (ekz. ano, ulo, ejo, anaro, aniĝi, reaniĝi, umadi, disiĝi, nedisigebla...)
- diversaj. (ekz. lernolibro, lernenda, lerninda, lernejo, lernmaterialo, lernobjekto, lernoĉambro...)
- kie, kiam - kiel - kiom - kiam, kial, kie. 4. venigu, saniga, verdiĝas, purigi 5. Diversaj respondoj...6. Italio: verda, blanka, ruĝa; Belgio: nigra, flava, ruĝa, Bolivio: ruĝa, flava verda.
- Ĉar ĝi ne kapablas kanti. 8. pri - pro - por. 9. kukolo, pavo – pigo
1. arboj; 2. virkoko; 3. Vjetnamio; 4. testudo kaj leporo; 5. Pasko.

LASTE

LA ABSOLUTE SPEKTAKLA TRIA ETAĜO



Rubrikestro:
Stefan MacGill

Jen nia revivigita rubriko LASTE. Dum multaj jaroj en *Revuo Esperanto* (la oficiala revuo de UEA) aperis rubriko LASTE APERIS, kun recenzoj aŭ artikoloj pri novaj libroj. Nu, bona titolo por ni povus esti 'LASTE' REAPERIS! Ĉe ni ne temas pri libroj (por ili ni havas alian rubrikon!). Ĉi-foje la temo estas urboj kaj landoj. Solvu la sekvajn taskojn kaj skribu la komenc-literon de la bona solvo en la keston maldekstre. Se vi faros tion lerte, ne nur vi povos ekesti talenta geografo, vi legos vertikale kaŝfrazon kiu rakontos surprizan (kaj eble timigan) fakton pri la urboj de la mondo.

- La plej granda urbo de Tanzanio, sed ne plu la ĉefurbo. *1
- La ĉefurbo kaj plej granda urbo en Mongolio.
- La dua plej granda urbo en Japanio – industria kaj apudmara.
- Urbeto en Finnlando, pli bone konata kiel marko de ir-telefono.*2
- Provinco kun la plej granda urbo de Kanado kaj ĝia ĉefurbo.
- La ĉefurbo kaj plej granda urbo en Irlando.
- Urbo en Argentino, Peruo, Honduro, Portoriko kaj Meksiko. *3
- La ĉefurbo kaj plej granda urbo en Anglio kaj Britio.
- La ĉefurbo kaj plej granda urbo en Grekio. *4
- La ĉefurbo kaj plej granda urbo en Urugvajo. *5
- Lando de la mezoriento, kies ĉefurbo estas Muskato.
- La plej granda urbo en Japanio inter Tokio kaj Kioto.
- Iu ajn el tri grandaj urboj en la valo Ruhr de Germanio.
- La ĉefurbo de Burkina Faso, en Centra Afriko.

- La plej granda urbo en Niĝerio – antaŭe estis la ĉefurbo.
- Urbo en Nov-Zelando, sur la orienta flanko de la suda insulo *6
- La plej granda urbo en en franc-parolanta parto de Svislando.
- La plej granda urbo en Nov-Zelando, sed ne la ĉefurbo.
- La plej granda urbo en Aŭstralio, sed ne la ĉefurbo.
- La dua plej granda urbo en Skotlando, kaj ĝia ĉefurbo.
- La plej granda urbo en Usono, sed ne la ĉefurbo. *7
- Urbo en norda Italio, en la friula regiono, 40 km de Slovenio. *8
- La plej granda urbo kaj la ĉefurbo de Italio.
- La plej granda urbo kaj la ĉefurbo de Hungario.
- La ĉefurbo de Kanado, sed ne ĝia plej granda urbo.
- Urbego apud Tokio, kie okazis la 92a UK en 2007.

Pied-notoj:



1. La nomo signifas 'Haveno de Paco' en la araba.
2. La kompanio nomita laŭ la urbo estis fondita en la urbo en 1865, kiel paperfabriko. Nur poste ĝi transiris al telekomunikado, kaj en la urbo mem neniam estis fabrikitaj ir-telefonoj. La urbeto estas apud Tampere, kie okazis la 80a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en 1995.
3. Krome ĝi estas provinco en Ĉilio kaj Filipinoj, kaj la nomo de bazo en Antarkto. En la hispana, ĝi signifas 'Espero'.
4. Tie okazis la 61a UK en 1976.
5. En tiu urbo okazis en 1954 Ĝenerala Konferenco de Unesko, kie estis akceptita rezolucio favore al Esperanto (legu ĝian tekston en la komencaj paĝoj de la Jarlibro de UEA.)
6. Tiu urbo troviĝas inter Timaru kaj Dunedin. Ĝi estas maoria loknomo. Serĉu ĝin komputile!
7. Tiu urbo ne nur ne estas la ĉefurbo de Usono, ĝi eĉ ne estas la ĉefurbo de la usona ŝtato, kiu portas ĝian nomon. Fama statuo staras en ĝia haveno – vidu la bildon! ↗
8. Tre malnova urbo, unue skribe menciita en la jaro 983; ĝia futbalteamo ludas en la unuagrada itala ligo.



Adiaŭa krucenigmo pri nia rubriko por etuloj

Unu rubrikestro transiris de LUME al LASTE. Jen krucenigmo en LASTE, kiu iumaniere iras en la inversan direkton. La horizontalaj vortoj ĉe 1, 3 kaj 5 (laŭ la supra vico) kaj 30, 31 kaj 32 (laŭ la plej suba vico) donas kaŝfrazon. Ĝi estas mesaĝo de tiu transirinto pri la enhavo de paĝoj 6 kaj 7 de la antaŭa numero – fakte tiuj paĝoj estis kunlabora prezentaĵo de la foriranta kaj nun alveninta nova rubrikestro. Ne eblis prezenti ĉi tiun krucenigmon en tiu antaŭa numero, ĉar tiam neniu sciis, ĉu ni trovus novan rubrikestron aŭ ne. **Bonan solvodon!**

1	2			3	4		5	6		7	8
9			10			11				12	
13		14							15		
16											
		17			18				19		20
21				22			23	24			
		25				26					
27	28							29			
	30					31			32		

(R) = Uzu nur la radikon, sen finaĵo.

Horizontale →

1. " ____ la kanto de kuraĝ' por maristoj dum vojaĝ'..."
3. "Al ____ mond' eterne militanta..."
5. Malunua. Kiel persono en la fino de vico.
9. Finaĵo por verbo en la nuna tempo.
10. Havas ideon aŭ opinion. "Mi _____, ke tio estas bona ideo."
12. Prefikso, kiu signifas 'denove'.
13. Denove bonigas la koloron de olimpika medalo, konvena por la gajninto de la unua loko.

15. Kun MO bieno, kun BO kolorigilo, kun UNO bak-pulvoro.
16. Tirilon de trajno.
17. Por malvarmigi sin, multaj japanoj uzas vent___ilon.
18. Kovraĵo de ŝafo. (R).
19. Mallongigo por la libro 'Judoj Sen Mono'
21. La plej granda oceana besto.
23. Loĝejo dumtempa farita el kanvaso aŭ plasto. Vidu la bildon.↗
25. Ses minus kvin.
26. "En la _____ venis nova sento."
27. Azia lando kun ĉefurbo Erevano; ĝia lingvo havas propran alfabeton, kiu aspektas tiel→
29. Unu el la geologiaj epokoj – ege longa tempo – pli longa ol la tempo kiun vi pasigas en bushaltejo atendante buson.
30. Hele.
31. " Nun ___ loko, flugu ĝi al loko."
32. Persona pronomo per kiu persono indikas sin mem.



Բոլոր մարդիկ ծնվում են և արժանապատկությունը ու բանականություն ու խիղճ

Vertikale ↓

1. Pri la baza eldonaĵo de UEA kiu donas la liston de delegitoj tra la mondo.
2. Verko pri scienca aŭ arta temo, tipe postulata en lernejoj.
3. Mallongigo: Lingvo Esperanto – Internacia Mirindaĵo.
4. Lando de Afriko, la ĉefurbo estas Luanda, oni tie parolas interalie la portugalan.
5. Iu, kiu ne kunportis ion.
6. Asocia Sidejo (mallongigo)
7. Post la anonco de la ekzamena rezulto, oni kutimas _____ diplomojn al la sukcesintoj.
8. La mikso de gasoj, kiun ni spiras. (R)
10. Kun inklino kaj ŝato al piedira aŭ alia ekskursado. (R)
11. Abunde manĝinta, plena.
14. Montru signalon per la vidaj organoj.
15. Konstruaĵo en farmbieno, kie oni tenas sekigitan herbon por nutri bestojn. (R – 4+3)
20. Pagilo. Povas esti farita el metalo aŭ el papero. Oni ne rajtas hejme fabriki tion.
22. Nek pasinte, nek estonte.
24. Ne ekstere.
26. Vestaĵa stilo – vidu al bildon! (R) →
28. Reĝa Libro (mallongigo)



Por ke nia revuo pluviu, ni urĝe bezonas pli da abonantoj kaj helpantoj. Jen vakaj oficoj; pri ĉiu ILEI pretigis priskribojn. Anoncu vin por ricevi tiujn!

Redaktoro por duono de la revuo:

Tasko: Rilati kun rubrikestroj kaj kontribuantoj, verki mem allogajn erojn, redakti kaj enpaĝigi ricevitan materialon, trovi ilustraĵojn, prizorgi la akademian lingvo-kontrolon, kaj mastrumi la kompensojn por viaj rubrikestroj. **Lertoj:** Bona lingvo-rego, teknika lerteco; respekto al limdatoj...

Varba direktoro:

Tasko: Rilati kun perantoj kaj la abon-administranto, por aktive varbi pliajn abonantojn, precipe por liveri la revuon kvante al E-kursoj, lerneja grupoj kaj projektoj. **Lertoj:** Enmerkataj lertoj, kapablo uzi modernajn komunikilojn por atingi ĉiajn partojn de la E-komunumo kaj novajn esperantistojn...

Reteja prizorganto:

Tasko: Pretigi kaj vidigi informojn pri la revuo en konstruata multlingva retejo de ILEI. Tio inkluzivu peranto-listojn, la vortliston, specimenajn artikolojn, informojn pri la plej aktuala numero, arĥivo de materialoj, kontinua varbagado. Evoluigi la sekciojn pri *Juna amiko* ĉe <lernu.net> kaj <edukado.net>. **Lertoj:** Kapablo mastrumi retejojn kaj allogi afiŝigi materiaojn, ene de komforte uzebla strukturo.

Eldonanto de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) jura sidejo: CO de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe <ileimondo.info>. Vidu <lernu.net> kaj <edukado.net>. **Redaktoro por la nuna numero:** *Stefan MacGill* (Pannónia u.30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario, *stefan.macgill@gmail.com*) **Lingva revizianto:** *Baldur Ragnarsson* (Islando). **Rubrikestroj:** *Juliana Vas-Szegedi*, *Judit Felszeghy*, *Karina MacGill* (ĉiuj Hungario), *Małgosia Komarnicka* (Pollando), *Monika Molnár* (Svislando), *Elena Nadikova* (Rusio). **Kunlaborantoj:** *s-ino Saliko*, *Anja Karkainen*, *Vesa Pölkki* (Finnlando), *Neringa Zasaite* (Litovio), *Jean Monique Noël* (Francio), *Jadranka Mirić* (Serbio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár*, *Zoltán Kurucz*, (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *José J. Campos Pacheco* (Kubo), *Jasuo Hori* (Japanio), *Gian Piero Savio* (Israelo), *Nguyen Thi Ngoc Lan* (Vjetnamio),. **Grafikisto:** *Pavel Rak* (Ĉeĥio). **Kovrila pretigo:** *Karina MacGill* (Hungario) Presita en Budapeŝto, Hungario

Administranto: *Sebastian Cyprych* <sebacyp@jabster.pl>

ISSN 0230 1318

La sekva numero aperos en septembro



**Historia
Rerigardo**

iik

**Ĵamaj
infanoj
Nunaj
plenhreskuloj**

**Fotoj el la 34a
Internacia Infana
Kongreseto (IIK)
en Zagrebo, 2001**



Kimono-parado



Fotoj: smg



CLAUDIA

por Sonmy



AŬTORINO:
SONMY
TRADUKISTO:
JOSE
DE J CAMPOS



EN KASTELO ...

...LOGĪS PRINCINETO...



..KIAM ŜI LUDIS, ESTIS TIOM DA MALORDO...

...KE ONI EĈ NE POVIS FORLASI LA ĈAMBRON...

...KAJ ANSTATAŬ FORMETI LA LUDILOJN, ŜI IRIS LUDI ALILOKEN...

...TIEL, KE LA SPACO MALGRANDIGIS, GIS...

PANJO, ALPORTU SKATOLON, POR KE MI ORDIGU MIAN ĈAMBRON!



AJ! JEŜ, MI JAM KOMPRENIS.



FAM